

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bukteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo
Redakcio kaj Administracio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

VOL. 1 N-RO 8
DEC. 1950

人民中國報道

EN TIU ĈI NUMERO:

Kulturo Revenas al la Laboristoj
Vilaĝo en Malnova Liberegita Regiono
Tu Sien-ĵang, Iniciatoro de
Fervoja Movado
Ĉaŭ Ŝou-fu, Talentulo de Minado
Ĵen Ĉang-ĵuan Kaj Tri
Terposedantoj

Anti-usona Batalo Disvolviĝas

Kiam la aeraj fortoj de Usono en Koreio pli kaj pli ofte invadis la teritorian aeron de nia Nordoriento, ĝia militŝiparo bombardis niajn komercajn ŝipojn sur komuna maro kaj ĝiaj armeaj trupoj lavange antaŭenpuŝiĝis al la nordorienta landlimo de Ĉinio, la artificio de la Usonaj imperiistoj unue invadi Koreion kaj poste Ĉinion fariĝis tute klara. Ni ĉinoj volas pacon, amas pacon kaj estas tutforte konstruantaj nian feliĉan estonton en paco, sed la Usonaj imperiistoj forrabis de ni pacon, altrudas al ni militon kaj malhelpas nian konstruon. Tio indignigis la ĉinan popolon. Tra la tuta lando alflugis entuziasmaj postuloj por volontule batali kontraŭ la Usona agreso, helpi Koreion, protekti siajn hejmojn kaj defendi la patrolandon. La indigna postulo tuj fariĝis ago. Volontuloj fluas al la fronto kaj tiuj kiuj ne estas permesitaj iri al la fronto obligas sian penadon sur sia posteno. Nun la kuna forto de la ĉina kaj korea popoloj jam denis al la Usonaj invadantoj fortan baton kaj liberigis Pjongĵang. La kontraŭinvada movado en Ĉinio disvolviĝas tiel rapide kaj tiel grandskale, ke estas neeble fari ĉiufilankan raporton per malmultaj vortoj. Tial ĉi tie ni nur citas kelkajn okazintaĵojn kiel ekzemplojn.

Volontuloj Fluas La plej senpera kontraŭinvada al fronto ago estas la voluntula movado. Ĉiu patrioto avidas la okazon iri al la fronto, kvamkam ne ĉiu povas akiri forpermeson de sia nuna posteno.

Tridek unu mil kamparanoj en du Nordorientaj provincoj sin organizis en brankardajn grupojn. Nordorientaj kamparanoj, studentoj kaj veturigistoj voluntulis por iri al Koreio aŭ kiel batalantoj aŭ kiel transportantoj. Kelkaj ŝoforinoj el Dajren (大連) kaj Port-Arturo (旅順) estas inter la voluntuloj, kaj traktoristoj voluntulis por manipuli tankojn.

En unu gubernio de Kirin-Provinco, (吉林省) 8,300 kamparanoj voluntis iri al Koreio kiel brankardportistoj, dum 160 koreoj voluntis reiri al sia lando por aliĝi al la Korea Popola Armeo.

Du mil kaj tri cent studentoj kaj kadroj de la Popola Revolucia Universitato en Pekino voluntulis por iri al Koreio. Tridek studentoj el la miaŭpopolo en Kuejĉou (州) voluntulis.

Donacoj kaj Leteroj Tiuj kiuj ne povas iri al la al la Batalantoj fronto esprimas sian volon kaj kontribuas sian forton per sendado de donacoj kaj leteroj al la batalantoj en Koreio.

Freŝe malsekigitaj legomoj estas sendataj de la kamparanoj de Nordorienta Ĉinio al la Korea Popola Armeo kaj la ĉinaj volontuloj batalantaj en Koreio.

Vintraĵ vestoj estas donacataj de la laboristoj en registaraj organizoj kaj publikaj societoj en la Nordoriento. En Mukdeno pli ol 10,000 tiajn vestojn donis laboristoj en 15 organizoj en tri tagoj.

Studentoj, fabrikaj laboristoj kaj aliaj sekcioj de la loĝantaro donas monon, sendas pakaĵojn kaj skribas salutleterojn al la Korea Popola Armeo kaj la ĉinaj volontuloj. La pakaĵoj entenas viŝtukojn,

ŝtrumpojn, gantojn, sapojn kaj aliajn aĵojn. Iu laboristo en alumet-fabriko skribis sian nomon por 40,000 juanoj po monato "Ĝis la Usonaj imperiistoj elpeligos el Koreio."

La movado La patriota kontraŭinvada movado **Profundiĝas** ankaŭ havas alian pli profundan aspekton. Oni persistas sur sia postfronta posteno kaj penas fari pli bone kaj pli multe. Membroj de multaj organizoj volonte uzas ekstran tempon por laboro lasita de aliaj kiuj foriris kiel volontuloj por servo en la fronto.

Tia aspekto inter la kamparanoj montriĝas en ilia fervora liverado de greno.

El ĉiuj provincoj, ĉi tiuj nove emancipitaj kamparanoj estis donantaj sian respondon al la Usonaj imperiistoj. La greno estis liverita kelkajn tagojn antaŭ la difinita dato kaj ĝi estis bone selektita kaj de bona kvalito.

En Liaŭtung-Provinco (遼東省) de Nordorienta Ĉinio, kie Usonaj aerinvadoj foje kaj refoje detruis la pacaan vivon de la popolo, la slogano estas "Donu la plej bonan por defendi nian patrolandon." Por liveri siajn kvotojn kiel eble plej frue, multaj kamparanoj tie draŝis kiam rikoltado ankoraŭ ne finiĝis.

En aliaj partoj de la Nordoriento, defioj flugis inter la vilaĝoj por vidi kiu senigos la publikan grenon (grenimposto) de koto kaj ŝeloj plej efike kaj estos la unua ĉe la liverstacio kun sia kvoto.

Iu kamparano Ho Lien-jung el Siaĉuang-vilaĝo Lingŝou-gubernio (靈壽) de Hopej-Provinco diris, "Nun la sekuro de nia lando estas grave minacata de la Usonaj imperiistoj, ni devas liveri nian grenon al la ŝtato por gardi niajn plibonigitajn vivrimedojn."

Inter la laboristoj tiu aspekto esprimiĝas en patriota konkurso. En Nordorienta Ĉinio, la 200,000 fervojaj laboristoj ĵuris plenumi ĉiujn transportajn taskojn sub ĉiuj kondiĉoj, respondante al la agresantoj.

Respondante al la la decido de siaj fratlaboristoj sur la fervojoj, laboristoj de la Mukdena Telekomunika Administracio garantiis precizan kaj rapidan servon sub ĉiuj kondiĉoj.

La konkurso ne estas limigita nur al la laboristoj. En Fuŝun (撫順), ekzemple, inĝenieroj, teknikistoj oficistoj kaj ĉe flegistinoj en la minejshospitaloj ĉiuj faris siajn planojn por par-

topreni la patriotan konkurskampanjon.

Gvidataj de la laborherooj, fervojlaboristoj de Tienzino, (天津) Pekino kaj Kalgano (張家口) konkuras por superplenumi siajn planojn.

En Ŝanhajo ĉiuj laboristoj ekagis. La Ŝanhaja Fabriko de Elektraĵ Iloj kompletigis sian produktan kvoton de transformatoroj por ĉi tiu jaro je la fino de oktobro kaj superis la planon je 11%.


Por pliiĝi sian produkton je 150%, laboristoj de ŝtatposedata fabriko decidis liveri 150,000 litkovrilojn en tri monatoj.

Kontraŭ-usona Manifestacio Ankaŭ la industriistoj kaj komercistoj esprimis sian volon kaj forton. Pli ol 42,000 homoj de industriaj kaj komercaj rondoj en Tienzino okazigis manifestacion je la 30a de novembro kontraŭ Usona agreso.

Pli ol 53,000 homoj de industriaj kaj komercaj rondoj reprezentantaj 136 metioj en Pekino okazigis manifestacion la 9a de decembro por celebri la liberigon de Pjongĵong kaj protesti kontraŭ Usona agreso.

Deklare publikigita de la manifestaciintoj diris, "Ni decidis intensigi niajn kontribuojn ambaŭ en homforto kaj materialoj por supteni la ĉinajn popolajn volontulojn en la Korea fronto kaj por fortigi nian naciaan defendon."

La ĉina popolo decidis ŝpari nenian penon en la lukto por paco. Kiel ajn furioze la agresantoj provas vastigi la militon, ili nepre malsukecos, ĉar la progreson de historio decidis ne la deziroj de la Usonaj militagantoj, sed la forto de la popoloj en la mondo.



ĈINA KAJ KOREA POPOLOJ KUNE BATALAS KONTRAŬ LA USONAJ AGRESANTOJ
Fang Ĉeng (方成) kaj Ĉung Ling (鍾靈)

ĜOJAN NOVJARON KAJ GRANDAJN SUKCESOJN
AL NIAJ KARAJ LEGANTOJ EN LA PACBATALO!

Kulturo Revenas Al La Laboristoj

Hua Pej (華丕)



La Pekina Kultura Palaco de Laboristoj sidas en la centra parto de la urbo kaj ĝia pordego malfermiĝas oriente de Tien-An-Pordego (la suda pordego de la Imperia Urbo) viciĝante kun ĝi. Tiu ĉi ruĝa konstruaĵo, kovrata de flavaj glazuritaj tegoloj, estis parto de la palaco de Manĉu-Kortego, nomata "Imperia Templo." En ĝi sin trovas antikvaj pinoj kaj cipresoj, marmoraj pontetoj kaj balustradoj, tre delikate gravuritaj traboj kaj kolonoj, kaj imponaj grandaj salonoj. Pasintatempe la sanktaj tabuletoj⁴ de la prapatroj de la feŭdaj imperiestroj estis metitaj en la salonoj. Antaŭ la liberigo oni iam malfermis la Imperian Templon, sed nur la "klaso de libertempohavantoj" povis ĝin viziti kaj ĝui. Nur post la liberigo, tiu ĉi heredaĵo, konstruita per la ŝvito kaj sango de l' laboranta popolo, estas repremita de la laboruloj mem.


La Pekina Kultura Palaco de Laboristoj estas la lernejo kaj ripozejo de la en-kaj ekster-urbaj laboristoj. Depost la malfermiĝo en la vespero antaŭ la Unua de Majo, neniam ĉesis la vizitado de laboristoj. Precipe urbaj laboristoj, ekz. fervojistoj kaj PTT-istoj, ĉiutage post laboro alvenas tien ĉi utiligi sian libertempon. Ili aŭ babiladas en la arbaro, aŭ legas librojn kaj ĵurnalojn en la biblioteko, aŭ lerneme rigardas ekspoziciojn, aŭ ŝakludas, bilardoludas, lernas kantojn kaj talitamburan dancan⁵. La ĉiutagaj vizitantoj de la Kultura Palaco, inkluzive ĝeneralajn urbanojn, nombras ĉirkaŭ 4-5 miloj; kaj la nombro duobliĝas en posttagmezo de sabato kaj la tuta tago de dimanĉo, ĉar tiam la eksterurbaj laboristoj venas urbon kaj vizitas sian palacon por sorbi iom da nutraĵo de la spirito.

Kvankam nelonge fondiĝis la Kultura Palaco, ĝi jam multe interesas la laboristojn. Preskaŭ ĉiuj agadoj donas alla laboristoj riĉan scion. La riĉa kulturo, kreita de la ĉinaj laborantaj popoloj, longe estis monopolata de la regantoj, tiel ke la laborantaj popoloj estis tiel malriĉaj ankaŭ en kulturo kiel en sia ekonomia vivo. Nun ili fariĝis mastroj de la regno, kaj ilia postulo por kulturo estas urĝa. Ili multe proponis al la Kultura Palaco esperante ke ĝi altigu ilin en ĉiuj flankoj. La Sindikato de la Presejo de la Politika Departemento de Nord-Ĉina Militregiono sendis al la Kultura Palaco donacon, sur kiu estas skribita la jeno: Sub via edukado ni volas fariĝi laboristoj de alta politika kaj kultura nivelo. Tio ĉi estas la volo kaj celo de la vasta, laboranta popolo.

La vizitantoj de la Kultura Palaco, plej ŝatas vidi foto-ekspoziciojn, ĉar en ili ne nur sin trovas riĉa scio sed ankaŭ la vivecaj bildoj. Unu post la alia oni okazigis foto-ekspoziciojn pri la historio de la ĉina laborista movado, la historio de la ĉina liberiga milito, la historio de la virina movado, konigoj pri Sovetunio, Bulgario kaj Rumanio, singardo kontraŭ fajro kaj spiono kaj la rezistmilito de Sovetunio kontraŭ Germanio. Dum la ekspozicioj la vizitantoj estis tre multaj. Finrigardinte la ekspoziciojn ili ankaŭ skribis siajn simplajn opiniojn en la opini-enskriban kajeron. Iu laboristo, kiu finrigardis

la fotojn pri la konstruado en Rumanio, skribis: "Se nur ni penas, sendube ni povos atingi saman rezultaton kiel iliajn." Alia ŝtal-laboristo de Ŝing-Monto (石景山) vidis en la fotoj pri Sovetunia rezistmilito kontraŭ Germanio, kiel la laborantaj popoloj de Sovetunio ŝanĝis la malprogreseman kaj malriĉan caran Rusion en fortan, kaj riĉan socialisman landon, kiel ili estis atakataj de faŝistaj rabistoj, forpelis la rabistojn kaj rekonstruis sian patrolandon. Finrigardinte la fotojn li skribis kun plena fido: "Penu! Penu! Lenu de la plaĝa fraĝo!" La laboristoj plej praktike komprenas la signifon de la vortoj lerni de Sovetunio.

En la Kultura Palaco ĉiusemajne oni kinematografas dufoje. La rigardantoj nombras 9 mil ĉiutage kaj la biletojn oni sendas laŭvice al la laboristoj de ĉiu fabriko. Inter la filmoj jam projekciitaj estas Sovetiaj filmoj kun eduka signifo: "Eterna sekreto," "Multkoloraj Kartunoj," "La Posteuloj de Ĉengis Han (成吉思汗)," "Heroo Malgranda," "Malproksima Fianĉino". La sublimaj karakteroj de Sovetuniaj herooj profunde influis la laboristojn. Ili despli bone komprenis kiel "ami la patrolandon, la popolon, laboradon, la sciencan kaj la publikan havaĵon". Kaj por ke pli multe da laborantaj popoloj estu kuraĝigataj de la modelo de Sovetiaj herooj, oni kinematografis tiujn ĉi filmojn laŭvice en la fabrikoj.



Pli grava metodo por la eduko de laboristoj estas organizi paroladokunvenojn de laborherooj por disvastigi la spertojn de antaŭirantaj laboristoj rekte al la vastaj amasoj de laboristoj. La Kultura Palaco invitis la laboristofabrikestron Liu Ing-juan (劉英媛) de Ŝing-Monto kaj la unuan novrekordokreantan heroon de Nordoriento, Ĉaŭ Kuo-joŭ (趙國有) por kelkaj raportoj, ke kelkdek mil laboristoj ne nur aŭdis vivecajn rakontojn, sed ankaŭ vidis la heroojn mem. Tio pluan paŝon altigis ilian fervorecon en la produktado. Multaj Pekinaj fabrik-laboristoj, aŭdinte la

paroladojn de l' herooj, pli entuziasmiĝis en la produkta konkurado.

Tio ja estas la necesa kaj nepra efiko de la Kultura Palaco de la Laboristoj.

Nuntempe pro ekonomia limigiteco, la kulturaj provizoj en fabrikoj de Pekino ankoraŭ ne povas kontentigi la postulojn de l' laboristoj. Sin trovas en la fabrikoj tre malmultaj libroj kaj gazetoj. Tial la biblioteko de l' Kultura Palaco fariĝas la proviza stacio de animaj nutraĵoj de la fabrikolaboristoj. En la biblioteko sin trovas kvar mil volumoj da libroj, 50-60 specoj da ĵurnaloj kaj pura kaj trankvila legoĉambro. Kvankam la produkta tasko de laboristoj estas tre peza, tamen 100-200 personoj venas legi en ĉiu tago. Tiuj, kiuj havas malaltan kulturenivelon legas popularajn broŝurojn kaj ilustritajn gazetojn; kaj tiuj, kiuj havas pli altan kulturenivelon, legas Sovetuniajn novelojn kaj socisciencajn broŝurojn. Ili havas komunan postulon, ke oni provizu pli multe da libroj por helpi ilin altigi produktan teknikon.

Krom instigi ilian fervoron en produktado kaj konigi al ili divers-

stigitis literaturistojn eniri la fabrikojn, verki kion la laboristoj ŝatas kaj helpi ilin en verkado. Novaj kantoj kantataj de malnovaj artistoj ankaŭ estas prezentataj antaŭ la laboristoj en vesperkunvenoj por pristudado. Tiel efektiviĝis en grandskalan organizitan movadon la slogano: "Arto kaj literaturo servu al la soldatoj, laboristoj kaj terkulturistoj".

En la flanko de amuzoj kaj sportoj de la laboristoj, la Kultura Palaco ankaŭ donas gvidadon kaj helpon. En la palaco sin trovas amuz-salono, en kiu oni povas ludi diversspecajn ŝakojn, bilardon, tablotenison, ktp. Ĉiutage la laboristoj, kiuj venas tien ĉi por amuzo, nombras ĉirkaŭ 3-4 cent personoj. Krome estas gimnastikejo kaj ekzistas placoj por pilkludejoj, kie ĉiudimane okazas amikaj konkursoj inter laboristaj teamoj, kelkfoje oni invitas studentojn pilkludi tie ĉi antaŭ la laboristoj, ke ĉi tiuj lernu de ili.

La antikva Imperia Templo fariĝis paradizo de la laborantaj popoloj, tiel opinias la laboristoj. Je la 25-a de junio, por antaŭcelebri la naskiĝtagon de la Ĉina Komunista Partio (je la 1-a de julio), oni organizis grandan gardenkunvenon, en kiu kvindek mil laboristoj ĝojege pasigis la tagon. La laborantaj popoloj dankas la Kompartion, dankas Prezidanton Maŭ Ze-tung, ĉar ili ne nur tenas en la manoj



SUPRE: LA KULTURA STACIO EN LA KULTURA PALACO, KIE LA LABORISTOJ POVAS SELEKTI LIBROJN GAZETOJN, Aŭ BILDGAZETOJN DE ILI ŜATATAJN.

MALDEKSTRE: LA ENIREJO DE LA PEKINA KULTURA PALACO DE LABORISTOJ. SUPER LA PORDEGO PENDAS SURSKRIBO DE PREZIDANTO MAŬ ZE-TUNG.

produktarmilojn por konstrui sed sub la gvidado de la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ Ze-tung revenis en la manojn de la laboristoj la reg-potenco, kaj ankaŭ la kulturo.

Trad. Zekun

⁴) sankta tabuleto: nomtabuleto de mortintaj gepatroj en la t. n. familia templo.

⁵) talitambura danc: danc en kiu la dancantoj laŭtakte batas cimbalojn kaj tamburojn ĉe la talio.

VILAĜO EN MALNOVA LIBERIGITA REGIONO

JOFU (藥 夫)

Klara mallarĝa rivereto fluas senbrue tra la strato. Junulinoj kaj kamparanoj lavas vestojn kaj legomojn sidante ĉe la bordoj. Sur la ruino de la konstruaĵoj forbruligitaj de la japanaj banditoj, nun oni rekonstruadas. Sur iuj fulgigitaj muroj jam konstruiĝis nova tegmento kaj sur iuj grandaj domfundamentoj konstruiĝis provizoraj unuĉambraj kabanetoj. La vilaĝo Tiangang (田崗) de Ji-Gubernio (易縣) en la malnova liberigita regiono de Nord-Ĉinio, ĝuste kiel ĉiuj dumlonge harditaj vilaĝoj en liberigita regiono, senŝancele kaj memfide arangas sian novan vivon. Tamen de ĝiaj aspektoj ankoraŭ videblas gravaj vundoj de militaj kaj naturaj plagoj. Oriente de la vilaĝo sur la kampoj ankoraŭ restas de superakvo sablotavolo 4-5 futojn dika; flanke de la stratoj ankoraŭ multas brikoj kaj tegolaj ruboj; en la vilaĝo kreskas ankoraŭ kompatinde malmulte da arboj. Sed tra ĉiuj ĉi eksteraj aspektoj mi vidas multajn novajn aĵojn kreskadi kaj evoluadi.

En hela lunlumo, la kamparanoj de la vilaĝo Tiangang pasigis la riĉrikoltan Aŭtunmezan Feston de ĉi jaro. Blank-haruloj kaj junuloj parolis kun mi pri la rikolto de tiu ĉi jaro. La ĉefa kampkreskaĵo de Tiangang estas maizo, kiun kulturas ĉiu familio. En tiu ĉi jaro la maizospiko kreskis tre dika. La produkta komitato ano Ju Loĉih (余洛政) diris: "La rikolto atingos 70-80 procentojn de plena rikolto". Ili diris, ke tiu ĉi rikolto estas malfacile akirita; ĝi estas la rezulto de serioza batalado kontraŭ natura plago.

Post la rikolto de tritiko, la junaj kreskaĵoj de maizo kreskis rapidege. La kamparanoj ĝenerale aldonis "urgigan sterkon" kaj kun sufiĉe da akvo la maizfolioj kreskis nigreverdaj kaj dikaj. La 9-an de la sesa monato (laŭ la luna kalendaro), nigra nubego alportis ventegon kaj pluvegon. Post trihora daŭro arbobrandaĵo rompiĝis, paj-laj tegmentoj de kabanetoj estis forblolvitaj kaj ĉiuj maizkreskaĵoj kuŝiĝis surteren, tute horizontale kvazaŭ kuŝigitaj de fluego. La kamparanoj iris tien kaj reen en la vilaĝo. Ĉiu el ili aspektis ĉagrenita. Sed la plago ne malkuragiĝis la harditajn kamparanojn; nova meza kamparano Haŭ Lo-huj (郝洛輝) konsiligi kun sia frato ĵus eksiginta el armeo, kaj decidis "restarigi la kuŝigitajn kreskaĵojn" laŭ la sperto en la batalado kontraŭ ventego en la pasinta jaro. Posttagmeze de tiu tago la kvar anoj de la familio kune restarigis unu mu-on¹⁾ da maizo. Vespere la Produkta Komitato de la vilaĝo faris decidon disvastigi tiun ĉi metodon tra la tuta vilaĝo. La anoj de la Novdemokratia Junula Ligo tuj iris sur monton por disaŭdigi al ĉiuj junaj kaj maljunaj vilaĝanoj la sloganon: "Kiom restarigita, tiom reviviĝonta. For pesimism-on!" Frumatene de la sekvinta tago la labora armeo disiris al la kampoj situantaj oriente, okcidente, kaj sude de la vilaĝo. Laboradis viroj kaj junuloj kaj maljunuloj, iuj starigadis dum aliaj

firmigadis la starigitajn kreskaĵojn per tero ĉe la radikoj. La kamparanoj kaj kamparaninoj laboradis de mateno ĝis tagmezo, kaj de tagmezo ĝis vesperiĝo; iuj el ili eĉ ne hejmen iris por vespermanĝi. La patrino de la batalanto Ju Li-ĉuan (余立全) kun sia bofilino finstarigis siajn 1.5 muojn da maizo kaj ili fariĝis jam kotulinoj. La maizo de la familio de Haŭ Loĉih (郝洛芝) al kiu mankas sufiĉe da laboraj manoj, estis starigita dank' al la filino kaj nepino. La tuta vilaĝo bataladis dum unu tuta kaj duona tago kaj plene sukcesis. Oni diris: "Ĉio dependas de la homoj; sengarantie estas ĉion esperi de la ĉielo."

La kamparanoj komprenas, ke oni nepre devas plibonigi la teknikon por pliiĝi la produkton. Sciencaj teknikoj estas disvastigitaj paŝon post paŝo en la vilaĝo Tiangang. Ĉijare la vilaĝo komencis disvastigi la kulturadon de terpomo, da kio oni, povas rikolti en ĉiu muo da tero pli ol 2000 kilogramojn, kvaroble pli multe ol la malnova speco. Oni ĝenerale praktikas semselektadon en la kamparo; dum la rikoltado de tritiko oni selektadis spikon postspiko. La kamparanoj aplikis novajn rimedojn kontraŭ afisoj. La Novdemokratia Junula Ligo semis trempitajn kaj netrempitajn tritiksemojn aparte en du potojn por montri al la popolamaso la rezultaton kaj disvastigi la metodon de semotempo. En iu ajn hejmo oni povas vidi, ke selektitaj semoj de milio, maizo kaj fabaĵoj pendas de la ĉevronoj kaj sub la tegmentrandoj. Konscia semselektado ĉe la popolamasoj estis tre malfacila en efektiviĝo dum multaj jaroj.

Antaŭ nelonge la vilaĝo Tiangang elektis sian labormodelon por partopreni la labormodelan kongreson en la gubernia urbo. S-ino Ju-Ma (余馬氏) patrino de la PLA-ano Ju, glorie elektigis la unua. Post la soldatiĝo de sia filo, ŝi laboradis eksterordinare aktive. Ĉiutage ŝi ellitigas meznokte por kolekti fekaĵojn, kaj tri korbojn ĉiutage. Kun la helpo de la vilaĝo, ŝi lasis nenium el siaj kampoj nesterkitaj. Ŝia vivo plibonigis ol antaŭe. Oni diris: "La fekaĵoj de la tuta vilaĝo estas de ŝi forkolektitaj." Fakte tio estas parolo iom troiga. Ĉijare la rezulto de sterkopreparado de la vilaĝo Tiangang superis tiun en ĉiu el la lastaj dek jaroj. En la printempo la kamparanoj ĝenerale malkonstruis siajn terlitojn³⁾. Ĉiu familio bredis porkojn por prepari

sterkon. Somere post kiam finiĝis la laboroj en la kampoj, ekleviĝis la tajdo de preparo de herbosterko. Ĉiutage pli ol tridek vilaĝanoj kun la vilaĝestro ĉe la kapo kiel modelulo eliris kolektadi absintojn kondukante dombrutojn. Iuj el ili komparas inter si la grandojn de siaj ŝultroportaj ŝarĝoj, aliaj komparas la pezojn de la ŝarĝoj sur siaj brutoj. La kamparanoj promesis garantii la provizadon al la familioj de la PLA-anoj, de tridek brutŝarĝoj da sterko po muo da kampo neirigaciata kaj sesdek brutŝarĝoj da sterko po muo da kampo irigaciata. La Produkta Komitato donis po 250 ĝis 1250 kg. da absinto al la familioj laŭ la nombro de iliaj laboraj manoj. Kaj la celo de tiu plano estis superita.

Ĉijare, okaze de la Printempa Festo⁴⁾, la vilaĝanoj en Tiangang rifuzis la postulon de aliaj vilaĝoj ludfesti, kaj responde al la alvoko de la komunista partiĉelo fondiĝis Komitato por la Konstruo de Irigacia Kanaletoj, kiu mobilizinte ĉiujn virojn kaj virinojn, junulojn kaj maljunulojn de la vilaĝo elfosis novan kanaleton 2.5 kilometrojn longan en 18 tagoj. La idealo, kiu ne povis efektiviĝi dum multaj jaroj, efektiviĝis en tiu ĉi jaro. La kanaletoj liberigis multajn laborantojn de irigaciado kaj ŝparas la elspezon pro aĉeto de irigaciaj instrumentoj kaj garantias ĝustatempan semadon. Post la aŭtuna rikolto de milio, la komunista partiĉelo ankaŭ proponis al la Vilaĝa Reprezentantaro ripari la kanaleton, kaj tion oni faris. Sub la gvido de la vilaĝestro Haŭ Lo-in (郝洛印) ĉiuj konkure alportis multajn ŝtonojn de sur la riversablejo for de la kanaletoj pli ol 100 metrojn kaj rekonstruis la somere detruitajn parton de la digo laŭ ĝi je 5 futoj kaj longan je 60 futoj, kaj riparis la kluzpordon. La akvo de la kanaletoj komencis irigacii la aŭtunajn brasikojn kaj la semado de tritiko estas garantiata. Bonaj produktaj kondiĉoj de la venonta jaro estas pretigitaj en tiu ĉi jaro.

Oni interesiĝas precipe pri la Kongreso de la Vilaĝa Reprezentantaro. Kiam ĉijare oni komencis elekti la reprezentantaron, iu distrikta kadro venis al la vilaĝo Tiangang por helpi a elektadon. Ĉiuj estis tre seriozaj. La kandidato de iu grupeto malsukcesis en la elektado, kaj tio igis la kadron iom maltrankvila pro necerto ĉu la elektito estas vere taŭga. La kamparanoj diris: "Tiu, kiun ni elektis, estas de ni konfidata, alie, pro kio do ni elektu?" Dum la pasinta jaro bone plenumiĝis la laboroj dispo de kampaj atestiloj, dublika prijuĝo de la produktokvanto de kampoj, rikolto de tritiko, konstruado de la kanaletoj,



LA 72-JARAGA KAMPARANO CAŬ ĴUNGŬN RAVIĜAS VIDANTE TIAJN DIKAJN RIZGRAJNOJN

protektado de la montaj arbaroj ktp. La Vilaĝa Reprezentantaro jam akiris tre grandan fidon en la vilaĝo. Ĉiu el la vilaĝaj reprezentantoj bone atentis pri la solidareco en la vilaĝo, ili pacigadas kverelojn inter la kamparanoj kaj solvi por ili problemojn.

La kamparanoj de la vilaĝo Tiangang unufanke produktas diligente kaj aliflanke klopodas plialtigi sian kulturan nivelon. Ili komencas zorgi ke iliaj infanoj lernu en lernejo. La junulinoj persistas ke ili nepre lernu en popola lernejo. Tiuj ĉi kamparanoj en la malnova liberigita regiono tre atentis pri naciaj kaj internaciaj okazaĵoj. Antaŭ la aŭtuna rikolto, en la pacokampanjo, ĉiu el la vilaĝanoj subskribis sian nomon al la Stokholma Pacalvoko. La anoj de la Novdemokratia Junula Ligo ofte disvastigas novaĵojn pri aktualaj okazaĵoj al la popolamasoj utiligante la ŝancojn de la tri "finoj" (nome, kampa, strata kaj terlita finoj). La sekretario de la komunista partiĉelo Haŭ Ĉun-ho (郝春和) estas antaŭ nelonge eksiginta soldato, kiu trifoje vundiĝis. Li parolis de la amasa kunveno de la tuta vilaĝo: "Ni akiris la venkon de la milito sub la gvido de Kompartio kaj la Popola Registaro. Nun ni estas kuracantaj niajn vundojn, ni devas gardi la pacan vivon, kiun ni akiris per ŝvito kaj sango."

La vilaĝo Tiangang jam fariĝis unu el la modelaj vilaĝoj de la Kvara Distrikto de la Gubernio Ji de Hopej-Province.

—esperantigis Laŭlum.

1) muo; mezura unuo de kampo, kiu egalas al $6\frac{2}{3}$ aroj.

2) S-ino Ju-Ma: Laŭ la malnova kutimo en ĉina kamparo edzinĝinta virino ĝenerale portas la familiajn nomojn de siaj edzo kaj patro (la familia nomo de la edzo antaŭ tiu de la patro).

3) terlito: lito el nebakitaj brikoj kaj hejtata dumvintre. La kamparanoj utiligas la teron de malnovaj nebakitaj brikoj de terlito por prepari sterkon.

4) Tio estas la novjaro laŭ la luna kalendaro.



VILAĜA KADRO HELPAS KAMPARANOJN SEMSELEKTI



REPREZENTANTOJ DE LA MINORITATOJ EN PEKINO DUM LA NACIA FESTO

NI TROVAS VARMAN HEJMON KAJ AMEMAJN GEPATROJN

Ŝih Cing (石膏 — moŝeano)*

Ni trovas varman hejmon
Kaj amemajn gepatrojn.

Antaŭe ni estis subpremataj, malsatataj
Kaj forgesitaj en fora limlando;
Sennombraj dezertaj montĉenoj ĉirkaŭis nin
Kaj nefinrakontebaj doloroj pezigis sur niaj koroj.

La reakeinuloj forpelis de ni la junulojn
Kaj rabis de ni grenon kaj brutaron
Kaj primokis niajn malprogreson kaj sentaŭgecon.

Ni estis kvazaŭ orfaj infanoj
Povante plendi al neniu nian suferon.
Krom ni mem,
Kiu ja sciis, ke ekzistas Moŝe-gento en Ĉinio?

Hodiaŭ ni trovas varman hejmon
En Ĉina Popola Respubliko;

Hodiaŭ ni trovas amemajn gepatrojn
En Ĉina Kompartio kaj La Centra Popola Registaro.

Malgraŭ mil kaj dekmil viceoj da montoj,
La varmaj gepatraj manoj
Trans ili
Karesas nin tiel
Ke ni ne plu sentas izolecon.

Kia varma hejmo!
Kiaj amemaj gepatroj!
Ilin ni amu kaj defendu bone,
Ne lasu enstrudiĝi la rabistojn kiuj embuskas ekster la pordo!
Ili volas atenci kontraŭ niaj gepatroj
Por fari nin siaj bovoj kaj ĉevaloj,

Ne! Kun decidemo ni diras 'ne!'
Ni defendos kun decidemo
Nian naci-familion,
Kiu kuraĝus ĝin ataki, tiu mortos nepre!

Trad. S. J. Zec.

* Moŝe estas minoritato disloĝanta en centra kaj okcidenta partoj de Junnan—Provinco.

(daŭrigo de p. 5)

de produkto. Ili vizitis la kampojn dum la rikolto, prenis la plibonigitajn grenojn kun si kaj montris al la ankoraŭ skeptikaj kamparanoj la profiton de semselekto.

Tre feliĉa homo.

Nun vizitantoj al lia domo trovas ke ĝi estas simila al galerio de agrokulturaj kreskaĵoj, kun specimenoj de ĉiuj specoj de grenoj kovrantaj lian skribtablon kaj murojn. Li mem troviĝas ĉe la vespera kunsido sur la draŝejo kune kun grupo de geknaboj ĉirkaŭ li, al kiuj li instruas la arton pri grefto de du junaj branĉoj.

Li estas tre feliĉa homo, kiu vidis per siaj propraj okuloj, la rezultaton de sia malegoista laboro kreskanta. Li povas promeni pli ol dek kilometrojn en ĉiun direkton de sia vilaĝo kaj vidi la kampojn plantitaj per gradigitaj semoj kaj kovritaj per dikaj spikoj de grenoj, aŭ iam senfruktajn montetojn nun tapiŝitaj per verdaj fruktejoj. Zorgema kulturo fariĝis la modo en tiu ĉi loko kaj ĉiu homo plibone vivas. Ĉar Liu ĉiam vivis kaj laboris sub la gvido de la Komunista Partio, li estis akceptita kiel ĝia membro je sia 64a jaro.

HOWENS

* Studanto de heredo kaj variado.

Jen estas la rakonto de la "ferbova movado", kiu rapide plialtigis la efikon de la Nordorienta fervoja sistemo kaj kies iniciatoro Tu Ŝien-jang (杜先揚) fariĝis delegito al la Tutlanda Kongreso de Labormodeloj, kiu okazis septembre en Pekino:

La vagonaroj de Nordoriento nun kuras akurate kaj laŭ pli rapidaj hortabeloj; frajtaĵo portata ĉiumonate duobligis ekde la pasinta jaro dume enspezo pliiĝis je 250 procentoj malgraŭ ke la pasaĝer- kaj frajt-kostoj estas pli malaltaj ol iam ajn antaŭe, nur preskaŭ dekduono de la antaŭaj kostoj.

Ĉi tiuj mirindaj sukcesoj komenciĝis de iu rompita, anhelanta, malnova lokomotivo, N-ro 96, revivigita el forlasita ferruba amaso, kaj iu juna hejtisto nomata Tu Ŝien-jang. Ĉi tiuj du, la juna hejtisto kune kun la malnoviginta lokomotivo, pioniris sur la Nordorientaj fervojoj la "team-respondecan" sistemon kaj komencis movadon kiu plene transformis la tutan reton da fervojoj. Iu ajn lokomotivisto nun sentos sin honorita, se li estas asignita veturigi N-ron 96, la nun fame konata "Ferbovo," kiun antaŭe neniu volus elpreni el la lokomotivejo.

Lokomotivo N-ro 96—La Maljuna Invalido

En 1947, kiam ĉiu peco de transportilo estis urĝe bezonata ĉe la fronto, la fervojaj laboristoj de la Sujhua-stacio (綏化站) finriparis en sia libertempo forĵetitan rustiĝintan lokomotivon, N-ro 96. Ĝi estis fundamente malfortika, kaj bruspiris laŭlonge de la reloj, ĉiam obstrukante la trapason de aliaj lokomotivoj pro siaj oftaj paneoj. Tial multaj proponis ĝin kondamni al morto.

Proksimume tiutempe la sovetaj fervojaj specialistoj konsilis ke la "team-respondeca" sistemo estu enkondukita sur la Nordorientaj fervojoj kaj Tu Ŝien-jang ĵus revenis de laborista trejnejo, plena je ideoj por helpi la pormilitajn klopodojn.

En la pasinteco Tu estis helpanto de lokomotivistoj dum multaj jaroj, sed

neniam promociita al lokomotivisto, ĉar, kiel li diris: "Mi ne havis monon subaĉeti japanajn aŭ Kuomintangajn oficistojn."

N-ro 96 Ricevita

Li aliris al la fervoja administracio kaj petis ĝin doni al li lokomotivon—iun ajn malnovan lokomotivon—kaj ŝancon por pruvi la efikon de team-respondeca sistemo. Ili donis al li N-ron 96 kaj grupon de ok malgraŭvolaj laboristoj.

La team-respondeca sistemo, kiel Tu diris, celas starigon de ekzakta divido de laboro inter la lokomotiv-laboristoj, donante al ili respondecon por eviti paneojn kaj riparojn, kaj "zorgi pri sia lokomotivo kvazaŭ ĝi estus ilia propra biciklo."

La plejparto de la laboristoj asertis ke la projekto estas ne efektivebla. Ili preferis la sistemon senrespondecan kaj lasi la oficistaron de la lokomotivejo prizorgi ĉion. Ili deziregis helpi la militon kaj laboris pli peneme por transporti provizaĵojn al la armeo, tamen ili ne ŝatis tuŝi la malnovan sistemon.

Duobligi la Normon de Kurado

Tu ekkomencis kun la ideo ke la kuranta periodo inter ĝeneralaj riparoj leviĝu de la normalaj 35,000 kilometroj ĝis 70,000 kilometroj, ĝuste duobligi la normon. La du spertaj lokomotivistoj en lia teamo diris ke tio estas ridinda. "Se la japanoj ne povis tion fari, kiel povas vi?" ili diris. "Kaj kun tia maljuna invalido kiu tiel facile malsanas! Vi nur volas altiri atenton."

Tu faris laŭeble ĉion por konvinki tiujn du veteranojn. Li ofte ne dormis kaj akompanis ilin dum iliaj postĉoraj horoj, instruante al si mem kaj ili la novajn metodojn.

Kiam la lokomotivo eliris el la lokomotivejo, li kutime ĝin kontrolis atente kaj poste ĉe la stacioj laŭlonge de la linio, se tempo permesis al li, li kontrolis refoje, farante malgrandajn ĝustigojn kaj notante ian ajn specialan



TU SIEN-JANG SUR SIA LOKOMOTIVO "FERBOVO"

DE FERBOVA MOVADO

progreson. Kiam li transdonis la lokomotivon al la sekvantaj deĵorantoj, li ĉiam diris al ili kiuj partoj speciale bezonas zorgon, kaj kiam li ĝin redonis al la lokomotivejo por la regula "B" riparado, li povis raportiti ĝiajn difektojn. Baldaŭ lia tuta teamo fariĝis spertaj mekanikistoj kaj N-ro 96 estis ne plu rigardata kiel la fripono de la Nordorientaj fervojoj.



TU SIEN-JANG PAROLAS KUN ALIA TEAMANO PRI LA LABORO KAJ LA VIVO

Teamo Konvinkita

Post mallonga tempo lia tuta teamo konvinkigis je la supereco de la nova metodo, ĉe Maljuna Liu, (老劉) kiu estis la plej obstina el ili ĉiuj kaj ĉiam en malbona humoro. Ili sentis ke ilia sociopozicio estas levita. Ili estis ne plu simple personoj kiuj envenis en lokomotivon kaj ĝin veturigis. Kontraŭe, ĝi estis ilia lokomotivo, respondante al ilia volo, kaj ili povis alporti pli multe da provizaĵoj al la fronto, ĉe pli rapide ol la plej bonaj lokomotivoj sur la linio. Estis Liu, kiu proponis ke ili okazigu mallongan kunvenon ĉiun vesperon por diskuti la plibonigon de ilia laboro, laŭ la spertoj akiritaj en la antaŭaj tagoj.

La naŭ membroj de la teamo fiksas regulojn por sia laboro. Ili starigis kun la riparaj laboristoj de la lokomotivejo tre intimajn rilatojn, tiamaniere ke ili ellernis fari pli kaj pli komplikajn riparojn dumveturajn. Senĉese kaj konstante ili rampis al la deziritaj 70,000 kilometroj kaj finfine en nov., 1948, ili atingis ĉi tiun ciferon. Kaj N-ro 96 daŭris kuradi en bona stato. Malgraŭ la rekordo ili okazigis nenian celebren. Ili plialtigis la celnombron al 100,000 kilometroj. En feb., 1949, ili raportis ke N-ro 96, la maljuna invalido, jam kompletigis 106,000 kilometrojn da perfekta kurado, kaj transdonis ĝin por ĝia unua ĉefa riparo post 18 monatoj. N-ro 96 estis honor-nomita la "Ferbovo."

Nova Sistemo Agnoskita

Tu jam demonstris la multe pli grandan efikon de la Sovetia "team-respondeca" sistemo ol tiu de la malnova laborstilo, en kiu kazo neniu laboristo volis esti respondeca por sia dunginto. "Viciĝu kun la 'Ferbovo'" fariĝis komuna devizo sur la Nordorientaj fervojoj, kaj la "ferbova movado" disvastiĝis ĉien kiel oleo sur akvo.

Post nelonge, la lokomotivo No-r 884 rekordis 110,000 kilometrojn da perfekta kurado; pliposte, la rekordo estis altigita al 180,000, kaj finfine al la nuna rekordo de 220,000 kilometroj. Sed pli grava ol tiuj astronomiaj ciferoj estas la ĝenerala plialtiĝo de laborefiko tra la tuta fervoja sistemo.

La Ŝatata Titolo

Nuntempe preskaŭ ĉiu stacio en la Nordoriento de Ĉinio havas sian fer-

bovan teamon. La meznombra kurado inter ĉefaj riparoj leviĝis de 35,000 ĝis 50,000, kaj nun ĉiu teamo celas al 70,000 kilometroj. Pli ol 2,000 teamoj estas honoritaj per la ŝatata titolo de

„ferbovo“.

LIU ĈJU-PAŬ, VERE SPERTA TERKULTURISTO

Semo pliboniĝas.

Liu komencis studi la problemon. Li zorge observis la kreskon de sia rizo kaj unu tagon li vidis tri spikojn de rizo, kiuj maturiĝis pli frue ol la aliaj. Li konservis ilin zorgeme kaj plantis ilin en la sekvanta jaro. Post skrupula kontrolo kaj selekto dum kelkaj jaroj, li trovis ke la rizo maturiĝas dusemajne pli frue ol aliaj lokaj specoj. Liaj semoj pliboniĝis ĉiujare kaj rapide dissemiĝis tra la ĉirkaŭa regiono.

Dume, li estis studanta la problemon de selekto de ajlo, kiu kreskos en la pli malvarma klimato de la regiono. Fine, li solvis ĉi tiun problemon plantante la ajlon en la frua aŭtuno kaj trovis ke tiu ĉi donis duoblan rikolton kompare kun tiu, kiu estis plantita en printempo.

Per zorga selekto Liu evolueigis multproduktajn, frue maturajn kaj kontraŭ-malsanajn rikoltojn. En la jaro 1946 li evolueigis 60 novajn diversajn specojn de milio, maizo tritiko, rizo, k.t.p. La gubernia eksperimenta farmo aŭdis pri li kaj helpis dissemi la novajn specojn ĉie.

Terkulturaj instrumentoj elpensitaj.

Sed Liu estas ĉiopova spertulo, ne nur specialisto pri novaj specoj. En la jaro 1946, kiam Ĉiang Kaj-ŝek komencis ĝeneralan ofensivon en la regiono kaj multaj junuloj devis militiri li prizorgis la laboran problemon, kaj elpensis sep malsamajn labor-sparigajn terkulturajn instrumentojn, kiuj multe faciligis la laboron en sarko kaj rikolto.

En 1944 li studis la uzon de akvo-

Nova Faro de la Movado

La movado nun transiras al nova fazo. Ĉiuj lokomotivoteamoj en la Nordoriento konkuras levi sian ĉiutagan kuradon ĝis 500 kilometroj por ankoraŭ plirapidigi la vagon-cirkuladon.

Tu Sien-jang ne plu veturigas la originalan Ferbovon. Unue li estis enoficigita prirespondi 8 lokomotivoteamojn, por disvastigi sian sperton plien, lasante Liu, sian iaman kontraŭstaranton kaj nun plej fidindan amikon, veturigi N-ro 96. Nun li estas vic-trafik-administranto ĉe Sujhua-stacio.

"Nia vivo estas bona," li diris, "ĉar hodiaŭ ni laboristoj estas la mastroj de niaj propraj fervojoj kaj ĉiuj niaj ideoj kaj energio povas esti direktataj al la altigo de nia vivnivelo. Nun miaj edzino kaj tri infanoj vivas bone, kaj ni estas reaĉetantaj la aĵojn kiujn ni estis devigataj forvendi por vivteni en la antaŭaj malbonaj tagoj."

Kaj mi rimarkis ke super vico da medaloj sur lia jakto, li portas insignon de la paca kampanjo—modeleto de la kolombo de Picasso.

—Nojo Lo

energio kaj rezultate en la vilaĝo starigis du kotonajn ŝpin-maŝinojn kaj unu rizo-muelejon, funkciatajn per akvo de la rivero.

Li aŭdis ke iam la vilaĝon Nanliu ĉirkaŭis arbarplenaj montetoj kiuj estis nudigitaj de jarcentoj da senpripensa forhakado dum la pasintaj regimoj.

Revo efektiviĝis.

En la jaro 1946 li starigis sian kulturejon en la vilaĝo kaj kulturis frukt-arbidojn. Post kvarjara penado, nun lia revo efektiviĝis. Li liveris al siaj sam-vilaĝanoj pli ol 7,000 arbidojn kaj organizis la plantadon de frukto-gardeno ĉie. Li ne tenas por si mem sian seion sed lia sola intereso estas disvastigi ĝin tiel multe kiel eble. Li organizis la spertajn kamparanojn en "teknikan grupon," kiuj donas konsilon al la tuta vilaĝo pri la problemoj

(daŭrigota sur p. 4)



ARBOPLANTADO Lidjun (力軍)

ĈAŬ ŜOŬ FU

—TALENTULO DE MINADO—

Vi preterpasus lin en la strato sen rimarki lin. Jen unu el la karakteroj de Ĉaŭ Ŝoŭ-fu (趙守福) kiu faris lin tiel utila por esti gerilano, kaj en la komenco dum la kontraŭjapana milito kaŭzis la milicajn gvidantojn en lia propra vilaĝo lin rifuzi pensante lin tro malsprita kaj malsaga.

Tamen, tiu "malsprita kaj malsaga" 31-jaraĝa antaŭa ŝafisto, kolportisto de arakido, agrikultura laboristo montrigis tiel genia en improvizado kaj metado de minoj kaj kaŝataj kaptiloj, ke li fariĝis famkonata kiel la "talentulo de minado" kaj teruris la japanan regulan armeon kiu anoncis grandan premion por lia kapo. Li direktis lernejojn malantaŭ la malamika fronto en kiuj li kaj liaj kolegoj trejnigis pli ol 10,000 aliajn kamparanojn en Orienta Ŝantung pri la arto kaj scienco de gerila batalo. Tiu nekredeble modesta homo estas famkonata tra la tuta Ĉinio. Kiel delegito al la Kongreso de Batalherooj kun la ordeno de "Milica Heroo" pinglita sur lia brusto, li efektivigis sian plej profundan deziron en intervidiĝo kun Prezidanto Maŭ Ze-tung ĉe la bankedo pro la honoro de la delegitoj.

Partopreni Revolucio

Li estis tre ĝoja kiam en 1942 revolucia laboranto venis al lia vilaĝo kaj parolis al li. Lia malfeliĉa vivo kaj tiu de lia familio, la parolo de lia frato kiu jam partoprenis en la Okavoja Armeo kaj lia malamalo kontraŭ la bienuloj kaj japanaj rabistoj, kunigis por sopirigi lin por esti utila en la revolucia movado. Ne estis facile por li en la komenco kunigi la agrikulturajn laboristojn, ĉar la japanoj postenis nur ses kilometrojn for, sed li tion faris—kaj ili strikis por altigi sian tro malaltan salajron.

La bienuloj ankaŭ unuigis kaj decidis ne altigi la salajron, sed la agrikulturaj laboristoj persistis en sia postulo, kaj finfine la batalo estis gajnita kaj la salajro ĝenerale duobligita.

Akiriinte kuraĝon el tiu ĉi triumfo, li fariĝis informisto por la subteraj revoluciaj laborantoj, penlaborante por la bienulo en la tago, kaj nokte li donis al la organizitaj kontraŭjapanaj fortoj regulajn raportojn pri ĉio kio okazis.

Memfarita Municio

En tiu periodo, diris Ĉaŭ, lia laboro estis tre limigita. Kelkfoje ili kaptis japanan spionon aŭ perfidulon kaj lin disponis. La milico tiam konsistis el ĉirkaŭ 30 viroj kaj knaboj en lia vilaĝo el 300 familioj. Ne okazis multe da batalo dum la vintro de 1942. Ili improviziis pafilojn kaj pafis al la lampoj sur japanaj fortikaĵoj. Iliaj pafiloj estis faritaj el feraj tuboj kiuj estis alportitaj antaŭe de la bienuloj al la vilaĝo. Ilia municio konsistis el iaj ajn pecoj de plumbo kiujn ili povis kolekti. Pri pulvo, ili eltrovis, tra provoj kaj malsukcesoj, formulon por fari vere efikan pulvon per kiu iliaj improvizitaj pafiloj povis pafi je distanco de duonkilometro kun sufiĉa efikeco.

Ili fabrikis la pulvon laŭ jena maniero: Ili faris specon de lignokarba pulvoro el salikbrandoj kaj kukurbo, per bruligado kaj poste muelado. Azotaton ili akiris de la subteraj revoluciaj laborantoj kaj pri sulfuro ili eltrovis provizon kiun la maljunulo en la vilaĝo rezervis antaŭ longa tempo. Krome kelkfoje ili atakis japanan provizan bazon kaj tiel akiris la ingrediencojn.

Famkonata Ŝtonmino

Ĉiuokaze la pafiloj servis al ilia celo. La japanoj sinsekve pafadis en respondo kaj malŝparis multe da municio. Sed kiam la japanoj alsendis pliajn fortojn, Ĉaŭ kaj liaj kolegoj eksperimentis siajn famkonatajn ŝtonminojn. Ili faris truon en ŝtono de konvena grandeco, plenigis ĝin per pulvo kaj en nokto metis la "bombojn" al kiuj ili kunigis meĉojn faritajn de ili mem el papero.

Dum tempo antaŭeniris, laboroj fariĝis pli bone organizitaj. Ili produktis pli bonajn pulvojn kaj taŭgajn meĉojn. Ili akiris pli bonajn eksplodigilojn. Kaj en 1943, per tiu ĉi simpla ekipaĵo, ili faris la vivon vere tre malfacila por la japana armeo.

La ekipaĵo estis tiel simpla ke ĉiu, kiu kuraĝis, povis meti la minojn; knaboj kaj virinoj povis uzi ĝin kun egale fatala efiko. Ekzemple, la rekordo de iu Ŝantung-junulo kiu komencis en la aĝo de 13, estis kiel la jeno: dum la periodo de la Kontraŭjapana Milito li metis entute 750 minojn el kiuj 250 eksplodis, mortiginte kaj vundiginte 220 japanojn, detruinte kvar ŝarĝaŭtomobilojn, unu kanonportilon kaj du ĉarojn.

Fariĝi Lertulo

Ĉaŭ kaj liaj kolegoj fariĝis tre lertaj. Nur en kvar monatoj ili manipulis 300 ŝtonminojn unuope aŭ grupe. Ili lernis enkapiti la malamikon per ĉiaj lertaj rimedoj kaj en unu fojo ili metis siajn kaptilojn ĉe kruevojoj, sur pontoj sur kaj proksime al arboj kaj en ĉiuj koncepteblaj lokoj kien la malamiko povus iri je la radio de 20 kilometroj. Ili ne nur mortigis grandnombre da japanoj sed ankoraŭ pli multe alnajlis per siaj agadoj; kaj plie protektis la vilaĝanojn kontraŭ la grenrabado de la japanaj soldatoj.

Kiam la japanoj fariĝis pli singardaj kaj lertaj por eksplodigi kaj fari minojn senefikaj, tiam la milicanoj fariĝis pli ingeniaj en siaj inventoj. Ekzemple, ili ofte metis transvoje tabulon al kiu amasoj da minoj estis alligitaj, sciante ke ĝi estus trovita kaj la japanoj singardeme tranĉus la alligilojn al la minoj. Sed ili jam ruze antaŭarangis la alligilojn per uzado de kaŝuka aŭ elasta ŝnuro ke ili resaltu

KULTURAJ

Laŭ plano de la Centra Filma Buroo 168 filmoj estos produktitaj en 1950, t.e. 84 longaj filmoj kaj 84 mallongaj. Nun kelkiloj da laborantoj en la tri Ŝtataj Filmo-fabrikejoj en Nordoriento, Pekino kaj Ŝanhajo per strĉega laboro garantias la produkton ambaŭ kvante kaj kvalite de tiuj filmoj.

En Nordorienta Filmo-fabrikejo 3 filmoj estas jam pretigitaj. Ili estas "La Kanto de Ruĝa Flago" (紅旗歌), "La Ŝtala Batalanto" (鋼鐵戰士) kaj "Defendo al la Lando kaj la Hejmo" (保家衛國). La ceteraj estas en la proceso de muzikaj aranĝoj kaj fotokombinadoj. En Pekina Filmo-fabrikejo rekordigis la plej granda sukceso de filmo-produktado. Kunlaborante kun la Sovetiaj filmolaborantoj ĝi faris du kolorigitajn filmojn "La Venko de la Ĉina Popolo" (中國人民的勝利) kaj "Ĉinio Liberiginta" (解放了的中國). Ili vivece kronikis la gloran venkon de la brava ĉina popolo kontraŭ la imperiistoj kaj reakciuloj.

"Ĝojo de la Kamparanoj" (農家樂) estas la unua filmo produktita de



LA MILICANOJ SIN EKZERCAS JE PAFADO

Sia Feng (夏風)

kiam ili estus tranĉitaj kaj tio eksplodigos la minojn.

Lerni Ĉiujn Artifikojn

Ili lernis ĉiujn artifikojn. Ili pentris sur la tero kolerigajn sloganojn aŭ incitajn karikaturojn de la japanaj gvidantoj—kaj poste en la Liberiga Milito, de Ĉiang Kaj-ŝek—kaj ĉirkaŭis tiujn per lerte kaŝitaj minoj kunligitaj al la karikaturo. Ili alligis minojn al arboj por ke ili eksplodu kiam la malamiko venis por faligi ilin.

Kiam ili fariĝis pli kaj pli vaste organizitaj kaj interligiĝis kun aliaj milicaj unuoj, ili eĉ ŝteliris en la domojn de la malamiko kaj metis minojn en gravaj konstruaĵoj. Okaze de tiaj taskoj, Ĉaŭ ofte iris nuda, kovrita per koto por eviti la montriĝon de si mem—ekzemple kiam li ŝteliris en japanan inspektejon en 1944 kaj metis tie kvar minojn.

Trejni Novulojn

En la Liberiga Milito kiu sekvis la japanan malvenkon, Ĉaŭ kaj liaj kolegoj ne nur kontinuigis siajn lertajn agadojn, sed ankaŭ disvastigis ilin; kaj en la Ŝantung-duoninsulo, 12,000 homoj lernis liajn metodojn. En iuj okazoj ili venis al lia vilaĝo kaj en aliaj okazoj li elsendis siajn kolegojn malproksimen. Ili kunlaboris intime kun la Popola Liberiga Armeo de kiu ili pli kaj pli akiris materialon kaj konsilon; kaj ili arangis la tempon de sia plej granda agado akorde kun la operacioj de la regula armeo.

Li ankoraŭ laboras en sia vilaĝo—la sama Ŝing-Vilaĝo en Hajjang-Gubernio (海陽縣). Li diris al mi ke li volas klopodi por produkti pli multe en agrikultura laboro de la vilaĝo "por repagi ĉion kion mi ricevis de mia nova Ĉinio." Li estas la organiza sekretario de la vilaĝa ĉelo de la Komunista Partio al kiu li aliĝis en 1943 kaj la prezidanto de la kamparana asocio de la vilaĝo.

Li ne travivis la batalojn senvunde. Tute ne. La vipado kiun li elportis kiam li iufuje ŝteliris en rezervejon de la malamiko por ŝteli sulfuron, lasis sian markon sur liaj dorso kaj renoj.

Sed kiam mi sidis ĉirkaŭ la tablo kun tiu ĉi "Milica Heroo" kaj liaj kolegoj li pacience klarigis al mi kiel la min-kaptiloj estis faritaj—uzante alumeton por pentri diagramojn, per iom da verŝiginta teo kiel inko, kiel li certe jam faris milojn da fojoj al aliaj modestaj, trankvilaj kamparanoj kiel li mem—mi pripensis kiel centoj da miloj da tiaj trankvilaj herooj estis en tiu ĉi vasta lando; kiom da malamikaj trupoj ili certe alligis ĝis ili nebligis la malamikojn plenumi siajn taskojn.

Ĉ. L.

*La Okavoja Armeo kaj la Nova Kvara Armeo dum la antijapana milito estis reorganizitaj el la antaŭa Ĉina Ruĝa Armeo kaj estis renomata la Popola Liberiga Armeo kiam Ĉiang Kaj-ŝek komencis la anti-revolucian internan militon en la jaro 1946.

la Ŝanhaja Filmo-fabrikejo. Baldaŭ pretigos ankaŭ la ceteraj filmoj priskribantaj la kreskiĝon de la popola armeoforto, la bravajn batalojn de la Ŝanhajaj laboristoj, la epokfaran historian renkonton de Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj ĉefkomandanto Ĉu Teh sur Kingkang-Monto, (井岡山) la vivon de kamparanoj post la agrara reformo ktp.

Ĉinio havas plej riĉajn teatrajn heredaĵojn. Nur de sursceneblaj teatraĵoj jam registriĝis 89 specoj. Krome troviĝas ankoraŭ 81 specoj de kantistoj kaj rakontistoj kun diversaj simplaj muzikaj akompanoj. La nombro de la laborantaro en tiu ĉi kampo superas 350,000 kaj la ĉiutaga vizitanto nombro ne malpli ol 1,800,000.

Post la liberigo tiu ĉi granda artista trupo spertas ankaŭ grandan transformiĝon. La enhavoj feŭdaj kaj venenaj estas anstataŭitaj per la pli sanaj kaj progresemaj. Por pli bone akceli tiun transformiĝon kaj pli bone akordigi la paŝojn, je la 27a de novembro malfermiĝis Tutlanda Konferenco de Teatraj Laborantoj en Pekino.

Samtempe oni arangis serion da prezentadoj de diversaj teatraĵoj por reciproka lernado. Organizigis ankaŭ ekspozicio pri teatraĵoj en kiu troviĝis teatraj verkoj, orientaj muzikinstrumentoj, fotoj de diversaj scenoj kaj famaj aktoroj, teatraj modeloj, kostumoj kaj fizionomiaj desegnoj.

Esperanto-instruado pli kaj pli disvastiĝas en Nova Ĉinio. Je la unua de novembro malfermiĝis en Pekino la unua Esperanta Kurso sub la gvido de la Ĉina Esperanto-Ligo. Ĝin partoprenas 240 lernantoj. La inaŭgura soleno okazis 5 tagojn poste en la salonego de la Centra Arta Kolegio. Ĉeestis la kursanoj, liganoj kaj gvidantaj kamaradoj, sume ĉirkaŭ 300 personoj. En la soleno k-do Hujuz (胡愈之), estro de la Centra Eldona Administracio, detale klarigis la esencon de Esperanto kaj gustan sintenon al lerno de Esperanto. En Ĉengtu (成都) ankaŭ bone iras 5 elementaj kaj 1 mezgrada Esperantaj Kursoj (el kiuj unu estas oficiale fondita en Huajang-Gubernia Mezlernejo—華陽縣中學) sub la gvidado de k-do Liu Hungkang (劉洪康) k. a. Entute pli ol 200 gekursanoj lernas Esperanton tie.

NOTOJ

Jen Ĉangjuan, la maljunulo, estis tre parolema. Finrakontinte sian antiinundan laboron, li komencis paroli pri la agra reformo, kaj poste la paroltemo turniĝis al tri terposedantoj kiuj lin ekspluatis.

“Teposedanto, kia terurajo! Vi mem imagu. Same kiel ni, ili ĉiam kuniĝis; ĉiuj volis nin ekspluati.

“Post kiam la japanoj forbruligis mian domon, mi kun mia maljunulino¹⁾ ne havis plu loĝejon, ni tranoktis jen tie jen tie ĉi efektive kvazaŭ almozulo. Ni ofte cerbumis, kiel konstrui por ni pajlotegmentan kabanon eĉ tiel malgrandan kiel birdokago. Sed per mia portvektio, mi povis perlabori nur nian manĝaĵon sed ne loĝejon.

“Kvankam mi ne havis monon por konstrui loĝejon, tamen la ideo ĉiam obsedis min. Cerbumante kaj cerbumante, mi fine priatentis lokon. Ĝi ne estis malproksima. Ĝi situis apud la boat-haltejo, unuflanke estis la rivero, aliflanke, la ĉefa vojo. La lokanoj nomis ĝin Kuejsing Ping (魁星坪). Tie troviĝis tombejo. Krom kelkaj tombejoj, estis grandspaca nekulturita tero, kie amasiĝis brikrompaĵoj kaj kadavroj de katoj kaj hundoj. Foriginte la malpurajojn, oni povus tre konvenstarigi tie kabanon. Kiam la kabano estus konstruita, mi pensis, mia maljunulino povus starigi budeton antaŭ la pordo kaj vendi teon kaj fajrolignon, dume estus pli oportune por mi iri de tie al la boat-haltejo. Vere bona situo.

“El la informoj mi eksciis, ke la terpeco apartenas al Kung (孔) familio. Inter ĝiaj familianoj mi konis sole Kung Kiencing (孔鑑清). Li estis bankrotinta bienulo kaj mi ofte renkontis lin ĉe la boat-haltejo kaj tiel konatiĝis kun li. Mi pridemandis lin kaj li diris ke la terpeco estas lia. Ni tuj interkonsentis, ke mi pagos al li tri toŭojn (rizmezurunuo, unu toŭ egalas unu dekalitron) kiel garantimonon kaj aliajn tri kiel jaran lupagon. Aldone, mi prizorgos por li la tombejojn, dum rekompence, li permesis al mi utiligi peceton da neglektita tero por kulturi legomon.

“La lukontrakto estis subskribita. Mi iris al mia fratino en Lungju-Gubernio (龍游縣) por pruntepreni monon kaj aĉetis iom da bambuo, ligno kaj pajlo.

Mi kaj mia maljunulino unue forigis

JEN ĈANGJUAN KAJ TRI TERPOSEDANTOJ

Veĵ Kinĉih

Jen Ĉangjuan (任樟元) estas modelo de antiinundaj laborantoj de Huatung Regiono (Orient-Ĉinia Regiono). Li estas la prezidanto de kamparana asocio kaj akvo-konserva komitato de Jeĉia Cun (葉家村 vilago de Je-familio), Kju-Gubernio (衢縣), Ĉekiang-Provinco. Sub lia gvido la popolanoj konstruis gravan digon kiu savis 178,000 muojn da rizkampo de la inundo. Veĵ Kinĉih (魏金枝), la verkisto, en septembro, akompanis la reprezentantaron de heromodeloj de Huatung Regiono al Pekino kaj intervjuis lin dumvoje. La jena artikolo rakontas pri lia sufero sub la premo de bienuloj.

la forĵetaĵojn kaj nivelis la grundon. Poste ŝi alportis teron kaj mi komencis konstrui muron. Estis laciga laboro, sed kiam ni ekpensis, ke ni havos propran loĝejon, kiam la nova domo estos konstruita, la membroj ne plu doloris kaj la spino rerektiĝis. Tiel ni fine konstruis duĉambran kabaneton. Kia bona loĝejo! Nokte ni dormis pli profunde kaj pli dolĉe ol kutime.

“Finkonstruite, ni komencis plugi la teron por legomkulturo. Apenaŭ mi komencis mian laboron, mi ekvidis, ke iu en longa robo²⁾, kun la manoj interplektitaj post la dorso iras tien kaj reen sur la ĉefa vojo. Kiam li pasis preter mi, li ĉiam rigardis min ridetante. Mi pensis: malbona signo! Mi ja ne konis lin kaj laŭ ekstero li estis riĉulo. Riĉuloj kutime sulkgigas la frunton al la malriĉuloj. Se li ridetas, tie jam kaŝiĝas io malbona. Efektive, mi apenaŭ finplugis du intersulkojn da tero, la homo reaparis. Tiufoje li ne ridetis sed movetis la mentonon kaj diris kun severa mieno: ‘Ej! Kiel vi nomiĝas, lamulo? Ĉu vi scias al kiu apartenas tiu ĉi tero?’ Mi pensis: Kion mi devas timi? Mi ja havas la lukontrakton en la mano. Mi diris al li mian nomon kaj pri tio, ke mi luprenis la teron de Kung Kiencing.

“‘Neeble,’ li diris. ‘Tiu ĉi tero apartenas al mi’.

“‘Sed Kung Kiencing diris,’ mi respondis, ‘ke la tero apartenas al la familia tombejo kaj li estas ĝia kontisto. Cetere ni jam subskribis lukontrakton kaj mi pagis al li ses toŭojn da greno. Se vi postulas kalkulon, reguligu la konton kun li.’

“‘Kiel tio koncernas min, ke vi pagis al li grenon. Eĉ se la tero apartenas al la komuna tombejo de la tuta familio, sed Kung Kiencing rajtas luigi, kial ne mi Kung Ĉangfu (孔章福)? Mi diras al vi: estu prudenta! La tero estas mia posedaĵo. Estas mia damaĝo ke la “malriĉa osto” jam prenis de vi la lupagon. Ni interkonsiliĝu. La sumo, kiun li prenis, estu la lupago de la pasinta jaro, kaj mi ricevu la ĉijaran!’

“‘Ni kontraktis pri jara pago, unu jaro ankoraŭ ne finiĝis, kian rajton vi havas por kolekti jam la pagon por la venonta jaro?’

“‘Se tiel, mi vin procesos. La terrajta akto ja estas en mia mano, ĉu mi ne povos

procesi? Vi ne pagos antaŭ ol esti enkarcerigita.’

“Mi do iris al Kung Kiencing kaj diris al li: ‘Kiu ja respondas pri tiu tero? Vi jam ricevis mian lupagon, nun Kung Ĉangfu ankaŭ postulas siaflanke. Kion fari?’

“‘Jes, mi estas ĝia kontisto, sed la terrajta akto restas ĉe li.’ Kung Kiencing diris embarasite.

“‘Ĉu mi devas pagi duoble tiukaze?’ mi demandis.

“Kung Kiencing silentis kaj ekparolis post longa paŭzo: ‘Por eviti nenececan malagrablaĵon, vi pagu al li la venontjaran. Li estas avarulo plena de ruzaĵoj, kiel povas vi disputi kun li?’

“‘Vi parolas facile. Ricevinte mian lupagon, vi ne helpas min, sed male persvadas min cedi al li. Mi ja ne havas kapablon pagi; se mi kapablus, eĉ deokoblon mi pagus. Cetere, se venus tria Kung-familiano, kion fari?’

“‘Neeble,’ li respondis ĵurante. ‘Se alia homo postulus de vi lupagon, ĉian konsekvencon mi prirespondos.’

“Kion fari? Kies estas la tero kaj al kiu mi devas pagi, mi tute ne scias. Sed la fakto, ke la tero ne apartenas al mi, estis nediskutebla. Mi interkonsiliĝis kun mia maljunulino. Post la forigo de la brikaĵoj, ĝi estis tute bona nigra tero, tre taŭga por kulturi legomon aŭ tritikon. Estus vera damaĝo ĝin abandoni. Estus pli granda damaĝo, se ni devus malkonstrui la domon kaj redoni la teron post la finkonstruo. Rememorante la mizeron de la pasinta senhejma vivo ni neniel povis fordoni la teron. Cetere, se ni luos alian pecon da tero, ni same devas pagi. Same pagi, kial ne pagi iom pli por tiu ĉi peco? Tiel konsiderante, mia koro jam moligis.

“Ni decidis inter ni. Sed ni timis, ke venus alia Kung-familiano kaj li eltordos monon de mi ankoraŭfoje. Por finarangi la aferon por ĉiam, ni elpensis rimedon. Unue kontroli la dokumenton. Kiu havas la akton, tiu devas esti la vera posedanto. Ĉar Kung Kiencing estis la kontisto, li ankaŭ subskribu sub la kontrakto. Mi kontraktos, se povos efektiviĝi tiuj kondiĉoj.

“Unue mi demandis Kung Kiencing, ĉu la kondiĉoj estas akcepteblaj. Li konsentis dirante: ‘Se Kung Ĉangfu konsentos, mi ne kontraŭos kompreneble.’

“Mi iris al Kung Ĉangfu kaj diris al li: ‘Mi luos la teron, sed unue montru al mi la dokumenton.’ Ne respondante ĉu li havas la akton aŭ

ne, li demandis kiom mi pagos. Mi diris: ‘Tiom, kiom mi pagis al Kung Kiencing. La garantimonon mi jam pagis, do lasu ĝin. Mi ankoraŭ pagos al vi tri toŭojn kiel jarrentumon.’

“‘Tri toŭojn? Tio eĉ ne sufiĉas por rekompenci la traserĉadon de la aktoj! Cetere, la tero apartenas al mi, Kung Kiencing ricevis garantimonon, kial mi ne? Vi tute freneziĝis, prenante la duononklon por sia propra patro. Mi diras al vi: du tan’ojn (1 tan=10 toŭoj) por garantimono kaj du por jarrentumo. Eĉ unu grajnon mi ne rabatos. Se vi volas marĉandi, malkonstruu la kabanon. Krome, reportu ĉion kion vi forigis kaj niveligu por mi la plugitan teron. Mi ne ŝatas profiti el via laboro.’

“‘Kvar tan’ojn! De kie mi ricevu tiom da greno! Ĉu mi kuraĝus akcepti tian kondiĉon! Mi diris do: ‘Ankaŭ ses toŭojn kiel antaŭe al Kung Kiencing.’ Sed li ne konsentis.

“Mi aldonis toŭojn post toŭoj. Unu toŭoj da greno kostis al mi pecon da karno, ĝi dolorigis mian koron. Mi diris la veron, mi efektive ne havis monon. Mi devis unue konsideri kion mi povas vendi por unu toŭoj da greno kaj poste aldoni al li tiun unu toŭojn. Toŭojn post toŭoj mi aldonis, kvazaŭ mi forportis unu post alia vestaĵon aŭ kovrilon el mia domo. Sed li neniom cedis, kaj ĉiam skuus la kapon dirante nenion. Kiam mi jam proponis unu tan’ojn kaj duonon kaj ne plu povis aldoni, tiam li konsentis malaltigi la lupagon je du tan’oj, dirante: ‘Du tan’oj, eĉ unu grajnon mi ne rabatos.’


“Fine ni interkonsentis, sed kie mi akiru la du tan’ojn da greno mi tute ne sciis. Ĉie mi pruntis, sed la sumo ne sufiĉis ankoraŭ. Kvankam la vetero jam malvarmiĝis, tamen mi portis la vatitan litkovrilon al lombardejo kaj tiel plenigis la postulitan sumon. Mi kredis, ke en la domo devas esti pli varme eĉ sen litkovrilo ol sub la libera ĉielo. Do mi iris al Kung Ĉangfu por esplori la dokumenton.

“Esplori la dokumenton—tio estis nur tromp-sajnigo. Mi konis nur la ideografojn, kiuj formas mian nomon, kaj tion mi eklernis nur kiam mi servis kiel laboristo sur la Ĉekiang-Kiangsifervojo (浙贛鐵路). Ankaŭ li divenis mian trompsajnigon kaj intence elportis amason da aktoj kaj metis antaŭ min, ke mi mem esploru. Mi elektis longe, sed la rezultato estis nur montri mian nescion. Fine li elektis por mi malnovan paperaĉon kaj legis al mi. Ĉar mi mem ne scipovis legi, do kiu scias, kian ruzaĵon li ludis tiam?

“La greno estis pagita, la kabano kaj la legomkulturado estis sekurigita. Sed venis jam la jarfino. La budeto kaj mia portista metio ĉe la boat-haltejo tiam ne havis klientojn. Malgraŭ ĉiamaniera ŝparado ni sukcesis reĉeti nur kelke da vatitaj vestoj, sed la litkovrilo pasis la novjaron en la lombardejo. Ni ne nur suferis malvarmon, sed ankaŭ malsaton. Ni manĝis maldensan rizkaĉon ĉiutage. Malfeliĉoj venas neniam unuope. Negŝtormo post pluvego detruis termuron de nia kabano. Necesis rekonstrui. Tamen oni ne povis labori en pluva tago, ĉar la tero kotigis, nek en nuba vetero, ĉar ĝi glaciĝis, nek eĉ en eksereniĝanta vetero. Oni devis ĝisatendi longedaŭran sunan veteron. Tamen ĝi ne venis dum tre longe.

“Mi riparigis ĝin kun frostigitaj membroj nur en la dua monato laŭ la luna kalendaro³⁾. La muro estis fine rekonstruita, sed kiom da sango kaj larmo

(Daŭrigo sur p. 8.)



DIGKONSTRUADO

Jang Han (楊涵)

(Daŭrigo de p. 7.)

ĝin saturis! Kaj jen aperis la tria bastardo de la Kung-familio!

"Tiu nomiĝis Kung Jungŝou (孔榮壽). Li estis ankoraŭ pli kruela kaj potenca ol Kung Ĉangfu. Li posedis du grandajn apotekojn kaj la juĝisto de la gubernia tribunalo loĝis ĉe li. Li sendis por venigi min al li. Li diris nenion alian ol ordoni min tuj malkonstrui la domon kaj redoni al li la teron. Se mi ne volis malkonstrui, mi pagu al li tri tan'ojn kiel garanti-monon kaj tri kiel jaran lupagon. Mi ankoraŭ furioziĝis kaj diris: 'Mi pagis lupagon al Kung Kiencing, jen venis Kung Ĉangfu. Mi pagis al Kung Ĉangfu, kaj jen venas Kung Jungŝou. Mi volas scii kiom da Kung-familianoj ekzistas kaj kiu estas la vera posedanto!' Li diris: 'Vi demandas, kiu estas la vera posedanto? Mi diras al vi: ni estas ses kuzoj, ĉiuj rajtas posedi la teron. Kung Kiencing estis kontisto, Kung Ĉangfu tenis ĉe si la terrajtan akton. Prave, ĉio ĉi estas vera. Sed nun ili jam cedis al mi la terrajton kaj nur mi rajtas kolekti lupagon. Se iu alia ricevis monon de vi, tio ne koncernas min.' 'Mi jam pagis, mi ne povas pagi duafoje. Se vi havas terrajtkonton, procesu!' 'Kompreneble mi havas akton. Vi kredas, ke mi ne havas akton? Ridindaĵo!' li diris.

"Mi pensis: ekzistas nur unu terrajtakto, ne povas esti duplikato. Ne havante dokumenton, li ne povas min procesi. Sed mi dubis ankoraŭ. Mi iris demandi Kung Ĉangfu. Kung Ĉangfu respondis: 'Ekzistas nur unu terrajta akto, kompreneble. Sed la tero herediĝis de prapatroj, oni ne scias kiom da jaroj jam pasis de tiam, kiel povas ekzisti ankoraŭ terrajtakto?' Mi hejmeniris kaj konsiliĝis kun miaj amikoj. Ĉiuj diris: vi pagis lupagon kaj havas lukontrakton ĉe vi, dum Kung Jungŝou ne havas dokumenton, kion li povus fari krom minaco? Kial lin timi? Kaj ankoraŭ mi pensis: mi ĉiel estas ruinigita, mi kontraŭstaros. Tiel mi ignoris lian minacon.



Kun Jungŝou ne havas dokumenton, kion li povus fari krom minaco? Kial lin timi? Kaj ankoraŭ mi pensis: mi ĉiel estas ruinigita, mi kontraŭstaros. Tiel mi ignoris lian minacon.

"Sed la bienuloj estis rimedoplenaj. Pasis du-tri tagoj, venis jam la proces-alvoko. Ĉe la unua juĝa kunsido, mi prezentis la du kontraktojn por ekzameno kaj insistis, ke Kung Kiencing kaj Kung Ĉangfu ricevis mian lupagon. Cetere, ili estis ja samfamilianoj kaj la pagita sumo devis esti valida. La juĝisto diris ridetante: 'La tero apartenas al Kung Jungŝou. Kompreneble nur li rajtas ricevi lupagon. La monon, kiun vi pagis al Kung Kiencing nun lasu, ĉar la kontrakto jam pasis la datlimon. Nur la lupago, kiun vi pagis al Kung Ĉangfu, validas ankoraŭ, vi povas ĝin repostuli. Procesu lin kaj mi ordonos lin redoni. Sed ĝi ne povas pasi en la konton de Kung Jungŝou.'

"Mi pensis: ĉu efektive ili jam cedis la teron al Kung Jungŝou? Mi iris demandi Kung Ĉangfu. Kaj Kung Ĉangfu diris: 'Sensenceaĵo! Ni cedis la teron al Kung Jungŝou, tio estas fakto, sed ni ja interkonsentis antaŭe, ke la ricevita lupago devas resti valida kaj ne estas repostulebla. Se vi bezonas mian ateston, mi aperos dum la juĝa kunsido.'

"Nun mi havis la subtenon de Kung Ĉangfu, cetere, la juĝisto ankoraŭ parolis afable. Mi prezentis respondon al la tribunalo. Dum la dua kunsido Kung Ĉangfu disputis kun Kung Jungŝou. Sed neniu sciis klare, ĉu tio estas vera aŭ nur sceneja pozo. Tamen la sinteno de la juĝisto ŝanĝiĝis, li prenis plumon kaj donis verdikton, ke mi perforte okupis la teron de Kung Jungŝou kaj devigis min malkonstrui kaj redoni la teron dum dudek tagoj. Mi volis disputi, sed li jam retiriĝis.

"Kion fari? Iuj el miaj amikoj diris: 'Kia maljustaĵo! Iru al Kinhua (金華) kaj apelaci al la supera tribunalo!' Iuj diris: 'Tio estas senutila. Ni kolektu amikojn kaj regalu lin per solida batado, kaj vidu, ĉu li ankoraŭ kuraĝos malkonstrui la domon!' Jes, por apelaci al la supera tribunalo oni bezonis monon, sed mi ne havis. Bati? La reakeia registaro ja ĉie arestis homojn, ni ne povis nin mem prezenti por esti mortpafitaj. Nenio estis farebla. Mi nur klopodis prokrasti. Aliflanke mi serĉis proparolantojn. Dume mi aperis dufoje en la juĝa kunsido de la supera tribunalo, Kinhua.

"Poste, la reakeiuloj nur atentis pri Hangĉou (杭州), kiam ĝi ankoraŭ ne

estis liberigita, sed je ilia surprizo, PLA (Popola Liberiga Armeo) jam aperis de malantaŭe kaj Kju-Gubernio subite liberiĝis.

Ĉe tiu punkto la antiinunda labor-modelo ekridis laŭte kun mallarĝigitaj okuloj. Li deprenis la bambupipon de post la nuko kaj ekfumis fervore. Li enspiris buŝplendon post buŝpleno kaj fine elblovis la fumon kune kun sia plendindaĵo en onduman fumdrakon je la longeco de 3-4 futoj.

"Nun," mi demandis, "ĉu vi jam finreguligis la konton kun ili?"

"Ne," li respondis.

"Kial? La abomenindaj bienuloj!"

"Mi estas tre okupata. Sub mia kontrolo estas ok administraj asocioj kaj tridek kvar kamparanaj unuigoj. Laboroj kontraŭinsekta, antiinunda kaj kooperativa: la manoj estas plenplenaj de taskoj. Mi nur menci la riparon de la ŝilpaŭ-digo (石壩堰). Ĝi postulis 15,000 labortagojn. Mi estas la prezidanto de la gubernia komitato de akvo-konservo, kaj devas ĉie ĉeesti kiel gvidanto. Antaŭe ni havis dek du labor-kadrojn sed post la reduktado restas nur tri, kaj unu el ili malsanas je okuloj. Cetere mi devas lerni legon kaj skribon. Mi ĉeestis la vesperan lernejon dum unu monato kaj lernis jam pli ol cent ideografojn."

"Ĉu vi memoras ankoraŭ la doloron, kiun vi suferis kiam vi lombardis la litkovrilon kaj konstruis la termuron?"

"Kial ne? Tian doloron mi neniam forgesos. Tamen, se mi komparas la likvidadon kun la laboro, certe, la laboro estas multe pli urĝa. Cetere, nun la registaro estas nia, se la praveco estas ĉe mia flanko, ĉio estos klarigita. Mi ne timas ke la bienuloj forkuros. Kial malpacienca? Mi tenas ĉe mi ĉiajn atestojn, ni likvidos iutage."

"Prave," mi diris. "Ni finreguligos la konton per agrara reformo. Post ĝi finiĝos ĉiaj ruzaĵoj de la bienuloj."

"En Kju-Gubernio ankoraŭ efektiviĝos agrara reformo ĉijare, ĉu ne?" mi aldonis.

Li kapjesis kaj ridis pligaje ke la tuta vizago sulkigis. Li daŭrigis: "Vi ankoraŭ ne scias, ke mi adoptis almozulon kiel filon, kaj mia maljunulino prenis nevinon el sia patra familio kiel bofilinon. Mi ankoraŭ ne diris al vi, ke mia maljunulino estis malriĉa vidvino. Ŝi estas dek du jarojn pli aĝa ol mi. Same kiel la juna paro ankoraŭ ni renkontiĝis duonvoje. Nun mia maljunulino ŝercis: 'Bone, vi zorgu vian taskon, ni plugos la teron kiel antaŭe, dume zorgos pri la budeto kaj daŭrigos la portistan metion. La hejmo ne bezonas vian zorgon.' Kaj mi respondis: 'Bone, ankoraŭ mi faros mian grandan familion pli feliĉa!'"

Ni ĉiuj aplaŭdis kaj ridegis.

Tradukis S. J. Zee

1) T.e. lia edzino.

2) En malnova Ĉinio riĉulo portis robon.

3) Almenaŭ unu monaton pli malfrue ol la Gregoria Kalendaro.

Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj!

Traduko, represo, resumo kaj ĉiumanieraj utiligoj de materialoj en nia bulteno estas permesataj kaj bonvenaj, kondiĉe ke ili ne estos malice kripligataj kaj la utiliginto plenumos niajn jenajn petojn:

- 1) Post la traduko, represo, resumo aŭ aliaj utiligoj rimarki aparte el kiu numero de nia bulteno ĝi estas tradukita ktp.;
- 2) *Sendi al ni 4 ekzemplerojn* de la traduko, represo aŭ resumo kaj sur ili noti el kiu numero kaj kiu artikolo ĝi estas tradukita ktp.;
- 3) Sciigi al ni kia estas la ĵurnalo aŭ gazeto, sur kiu aperis la traduko, represo, aŭ resumo kaj, se eble, kiom da legantoj ĝi posedas.

Se iu el vi, karaj samideanoj, interesiĝas pri Popola Ĉinio, bone utiligas niajn materialojn kaj volas pli multe informiĝi, sciigu al ni vian bezonon kaj ni volonte vin provizos laŭeble.

"Plej bona propagando estas praktiko". Estas jam tempo por antaŭenpuŝi nian movadon al pli alta stadio ol nur propagandi. Kunlaboru, ĉiuj esperantistoj tra la tuta mondo!

ABONMANIERO

1. Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu, kiu letere postulos. Se iu volas regule ricevi nian gazeton, volu pagi al niaj perantoj aŭ rekte al nia administracio.
2. Kun ĉiuj esp-eldonejoj kaj esp-gazetoj ni volonte interŝanĝos reciproke periodaĵojn aŭ librojn. *Sed de individuaj legantoj ni ne akceptas gazetojn.* Se en lia lando ankoraŭ ne troviĝas nia peranto li povas aboni per respond-kuponon aŭ novaj esp-aj libroj.

ANIAJ PERANTOJ:

BRITLANDO: Collet's Subscription Department, 40 Great Russell Street, London, W. C. 1. (Jarabono 6 ang. Ŝil.)

ĈEĤOSLOVAKIO: Slovaka Esperanto-Instituto, T. S. Martin, Kuzmany-str. 29. ĈSR-Slovakio. (Jarabono 50 kĉs.)
Burda Rudolf, Plzen-palackeĥo N. 66,

FINNLANDO: Niilo Kavenius, Niklaksenkatu 10/14 Turku. (Jarabono: 300 Fmk.)

FRANCIO: Labor-Esperantista Federacio, 34, Str. Chabrol—PARIS—X. (CCP. Paris 902-52) (Jarabono: Fr. Fr. 450)

GERMANIO: Arthur Schulze, Berlin-Lübars, Kolonie, Waldesfriede 77. (Jarabono: 6 D.M.)
Erich Rödel, Leipzig W 33, Becherstr. 10.

HUNGARIO: IBUSZ, Budapest, V. Akademia u. 10. (Jarabono 20 forintoj)

POLLANDO: Isaj Dratwer, —Asocio de Esperantistoj en Pollando Warszawa Marszalkowska 81/32 (Poŝteka konto P.K.O. I 8266/115) (Jarabono 4 zl.)

SVEDIO: Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg. (Jarabono 6.50 Kronoj)

Rimarko: Legantoj en aliaj landoj de *Nord-Eŭropo* estas petataj ankoraŭ sendi sian abonon al nia sveda aŭ finlanda peranto. Por legantoj en *ceteraj landoj* ni provizore fiksas la prezon je unu respond-kuponon por ĉiu numero aŭ samvaloraj novaj esp-aj libroj.

國內定價：每期基價一元五角。全年十二期基價十八元。平寄郵費在內。掛號另加

NIA POŝTKESTO

EL SVEDIO

Karaj ĉinaj samideanoj!

.....Pri la nova, popola Ĉinio mi havas grandan intereson. Unue pro tio, ke ĝi estas grandega ekzemplo pri la forto de la demokrataj ideoj en la mondo. Krome ĝi estas grandega bastiono por la paco, kiun nun minacas la Usonaj rabistoj kun la hipokrite religia Truman en la unua vico. Kun sentoj de neesprimebla abomeno ni pac-kaj liberec-amantaj esperantistoj rigardas la agadon de Usonaj banditoj en Koreo kaj sur via insulo Tajvan. La larĝbuŝaj usonanoj ĉiam fanfaronas pri "biggest in the world" (plej granda en la mondo) kaj efektive nun, se temas pri mensogema propagando kaj abomena agado, ili estas majstroj! Eĉ Hitler, Mussolini aŭ Franco ne kuraĝis tiom senhonte kaj trompe propagandi pri "paco", "libereco" kaj "demokratio" kiel nun faras Truman kaj liaj anime putraj servistaĵoj en ĉiuj landoj. Kaj dume la bomboj disŝiras la nearmitan loĝantaron de Koreo! Ni kiuj havas la dubindan honoron vivi en la okcidenta parto de Eŭropo, povas ĉiutage konstati kiel abundas mensogoj kaj kalumnioj pri la veraĵ demokratioj en "nia" radio kaj en

"niaj" ĉiutagaj gazetoj kaj revuoj..... Pli profunde, la demokratio ne estas ĉe ni. Tiu kiu volas havi bonajn laborebl-ecojn nun devas el tuta koro kredi je Truman. Antaŭe estis devo kredi je Hitler ĉe ni. Tamen tia stato feliĉe ne daŭros eterne. Via granda popolo certe estos instiga ekzemplo por aliaj popoloj.....Mi esperas el tuta koro, ke baldaŭ la korea kaj ĉina popoloj definitive venkos la nunan tiranon de la mondo, la Usonan kapitalismon.....

Via G. Nilsson

Tallvägen 345, Viggbyholon, Svedio

EL JAPANIO

Karaj gekamaradoj,

Kun kora danko mi ricevis de vi senditan ĵurnalon "El Popola Ĉinio" en kiu mi povas rimarki admirindan konstruadon de la Ĉina Popola Respubliko. Ĉe ni reakeia registaro subpremas popolamason kaj oni diras ke militbazo estas konstruata. Mi devas stari kontraŭ milito kaj defendi la pacon. Mi esperas vian helpon!

Kun kamaradeca saluto

Prof. T. N.